 „**Ni sekvu Lin**“ de H. Sienkiewicz, trad. B. Kuhl 40 k. r. k.
 „**Mia Libro**“, poezioj de Leono Zamenhof, 25 kop. r. k.
 „**Improvizacio de Konrad**“, trad. R. I. Dobrzański, 25 k. r. k.
 „**ANTAŬEN KUN KREDO**“, liter. jarlibro de „P. E.“ por 1911—1 r. r. k.
 „ „ „ por abonatoj de „P. E.“—50 k.

Apatre broŝuritaj el „Antaŭen kun kredo“:

„**Historiozoŝio de lingvo internacia**“ de S. A. Dobrzański, 5 k. r. k.
 „**Mia Poŝhorloĝo**“ de M. Konopnicka, trad. Kabe, 15 k. r. k.
 „**Pax**“ de J. Zuławski, trad. Wl. Grabowski, 20 k. r. k.
 „**Sommo-Sierra**“ de Wl. Gąsiorowski, trad. D-ski, 10 k. r. k.
 „**Aŭtuna agordoj**“, poezioj de L. Staff, trad. J. Tuwim, 10 k. r. k.
 „**La ĝemo de l' vivo**“ de E. Orzeszkowa, tr. M. Czerw., 15 k. r. k.
 „**Libroj de Profetoj**“, poemoj de A. Lange, tr. A. Grabowski, 15 k. r. k.
 „**Fabelo pri homo felĉa**“ de J. Zuławski, tr. M. Czerw., 15 k. r. k.
 „**Nalo kaj Damayanti**“, poemo el sanskrito trad. A. Lange, 15 k. r. k.
 „**Tri noveloj**“ de diversaj aŭtoroj, 15 k. r. k.
 „**Al mokantoj**“, artikolo de S. A. Dobrzański, 05 k. r. k.

Propagandaj kaj instruaj eldonoj:

Ĵęzyk Międzynar. Esperanto, arkusz propag. 1 k., 100 — 85 k. r. k.
Klucz Esperanto (Czêfecâ'a), pola eldono, 2 k., 50 ekz.—80 k. r. k.
 „ „ „ luxa eld. 1 ekz.—3 k., 50 ekz.—100 k. r. k.
Klucz Czefecza w jêz. franc., niem., angiêl., włosk., szwed., hiszp., katal., wêgier., duńsk., czesk., portug., ros., rumun., holend.—1 ekz. 3 k., 10 ekz. 25 k., 50 ekz. 1 r. r. k.
Podręcznik jêz. Esperanto L. L. Zamenhofa (wyd. Arcta), 25 k. r. k.
Vortaro esperanta-pola eldono de „P. E.“ 20 k. r. k.
Vortaro esperanta-pola sur unu folio 5 k., sur kartono 15 k. r. k.
Propagandaj poŝtkartoj kun pola teksto 1 egz. 1 k., 10 — 8 k. r. k.
„Adresaro de polaj esperantistoj“, verkis A. B. Brzostowski, 10 k. r. k.
„La Taglĝo“, esper. kanto de A. Grabowski (kun notoj) 10 k. r. k.
„Kiel rompiĉta vente arbeto“, ario el opero „Halka“, trad. A. Grabowski, kun notoj, 10 kop. r. k.

Sumo r. k.

La monon rb. kop. mi sendas per bankĉeko, skribu legeble
 postmandate
 Nomo
 Lando
 Urbo
 Strato

Ankaŭ mi petas ekaboni por mi jenajn esperantajn gazetojn:
Proszę o zaprenumerowanie dla mnie następujących pism:

kaj liveri al mi jenajn esperantajn librojn:
i o dostarczenie mi następujących książek:

NOTO. La abonantoj de „Pola Esp.“, mendantaj suprenomitajn eldonaĵojn, krom senpaga poŝta trasendo ricevas rabaton: ĝis 1 rub. 10% kaj ĉe pli grandaj kalkuloj — 20%.

*Malĝoja satano sur mian ĝardenon
Ĵetegis teruran, mortplenan malbenon.
Kun frunt' sulkiĝinta, klinita li paŝis
Kaj florojn aromajn sub cindro li kaŝis.
Per ŝtonoj surĵetis herbarojn, foliojn
Kaj semis terurojn kaj mortajn pasiojn
Kaj mem timiĝinte satano freneza
Sur ter' cindrigita kuŝiĝis plumb-peza,
Volante ĉagrenojn forgesi... kaj varmajn
Brulantajn, ĝemantajn elverŝas li larmojn...*

*Jen vitrojn pluv' batas, pluv' batas aŭtuna
Kaj plaŭdas senĉese, enue, grizbruna...
Pluv-gutoj frapetas laŭ ritm' neŝanĝema,
Plor' vitra, son' vitra... ĵunebra kant' ĝema,
Kaj grize lum' brilas dum tago sensuna...
Fenestron pluv' batas, pluv' batas aŭtuna...*

El pola lingvo tradukis *JULJAN TUWIM.*

KAZ. PRZERWA-TETMAJER.

Apud la torento.

Ho, bruo de la montara torento, ho, bruo de l' torento... Kun fermitaj okuloj mi vin aŭskultas, kiel vi daŭras seninterrompa, monotona, eterna...

Kaj mian animon plenigas tia bedaŭro, tia malĝojo senlima.

Jen tiu bruo estas konata al mi de multaj jaroj, de la plej frua infaneco, ĉiam la sama, monotona kaj eterna — kaj kiam mi revenas per memoro en pasintecon, kiom da fojoj mi vidas min apud tiu montara torento, same kun fermitaj okuloj aŭskultantan ĝin, kun la sama bedaŭro, kun la sama senlima malĝojo en la animo.

Forpasadis la jaroj de mia infaneco, forpasadis la jaroj de mia junaĝo printempa, kaj nun forpasas la jaroj de l' vivo ĉiam pli kaj pli malproksimen kaj senrevne — kaj denove mi staras nun apud la torento kun la sama

bedaŭro en la animo, kun la sama senlima malĝojo.

Mi kvazaŭ bedaŭras ion, kion mi forlasis, kaj ion, kio ne venos; kvazaŭ mi malĝojas pro la perdo de iu kara al mi objekto, kiun mi ne vidis kaj kies ekziston mi povas nur antaŭ-senti, kvazaŭ mi sopiras al io foriranta, kio neniam eĉ haltis apud mi...

Kiomfoje mi etendadis la brakojn al la ridetoj de l' sorto, kiuj estis trompaj — kaj poste mi staris apud la montara torento, kun fermitaj okuloj, aŭskultante ĝian bruon monotonan kaj eternan, kun tiu bedaŭro kaj malĝojo senlima en la animo...

Ĉu ĉiam do estos tiel?

Ĉu neniam, neniam apud tiu bruanta ondaro mi havos alian senton, nur tiun bedaŭron kaj tiun malĝojon senliman?...

Trad. Tad. Ficowski.

La leciono de franca lingvo.

De Fr. Reinstejn.

Sur la muroj de la infana ĉambro vagas movemaj ombroj de akaciaj branĉoj apenaŭ ion.ete kovritaj per burĝonoj, el kiuj baldaŭ ekpafos folioj. Tiuj samaj branĉoj, sed efektivaj, plej maldiskrete ŝtelrigardas en la fenestrojn. En la ĉambrom eniris rigidema ofic-pedanta *mademoiselle*, pagata pohore. *Mademoiselle* sidiĝis apud tablo dorse kontraŭ la fenestro. La suna lumo dolorpikas la okulojn de l' instruistino, malfortiĝintaj dum 15—18 jaroj de l' okupado kaj krom tio, sidante dorse kontraŭ la fenestro, ŝi povas pli facile observi la horloĝon, pendigitan sur la muro.

— Kie estas Sonjo?

Ĉambristino sciigas:

— La fraŭlineto forkuris.

— Forkuris?!

— En la ĝardeneton, al la knabinoj, kiuj tie saltadas trans ŝnursaltilon.

La hejmsinjorino frotas per ambaŭ manoj sian ĉagrenitan frunton.

— Je ĉi-tiu knabino fariĝis io de kelka tempo... ŝi ĉiam estis obeema... Manjo, venigu ŝin tuj..

Mademoiselle sidas senmove kun la manoj kunplektitaj sur la brusto. Por ŝi estas afero indiferenta, ĉu Sonjo faras la lecionon aŭ „perdas postsignojn de bonedukado en societo de popolaĉaj knabinoj“. *Mademoiselle* venis por „tempo“ kaj potempe estos pagita.

En la ĉambrom, pli ĝuste enfalis en eniris la krimulino. La vizaĝeto ardas, el sub la kombilo eliĝis vilo da haroj kaj malseka de ŝvito algluiĝis al la frunto.

— *Mais que ce que ça Sophie?* Kiu permesis al vi, Sonjo?

Ŝi per unu eksalto troviĝis sur la

seĝo vizaĝe kontraŭ la fenestro, trans kiu ĥoro de maldikaj pepemaj voĉetoj kantas infanan kanton.

Mademoiselle komencas la ekzekuton.

— Maristo?

— *Le matelot.*

— La maristo de nia ĝardenisto?

— *Le matelot de notre jardinier.*

— La maristoj de niaj bonaj najbaroj formangiĝis la ĝardeniston kaj liajn matracojn?

Sonjo ŝvingas la piedetojn, pendantajn super la planko, plentute aŭskultante la bruon de la printempaj voĉetoj.

— *Repetez donc, Sophie, et attacher l'attention:* La maristoj de niaj bonaj najbaroj formangiĝis...

Sonjo eksplodis per ploro:

— Maristoj ne formangiĝis ĝardeniston, nek liajn matracojn! mi ne volas... mi volas al la infanoj, en la ĝardeneton!

Mademoiselle trankvile ekrigardas la horloĝon, la hejmsinjorino ekstaris en pozo de *Niobe* kun la manoj interplektitaj ĉagrene.

— Sonjo — ŝi diras per indignita voĉo — *mademoiselle* diras, ke ili formangiĝis, kaj vi kuraĝas ne kredi...

Suĉite la patrino faras eltrovaĵon:

— Ŝi ja ne preparis la lecionon! Ŝi havas la kapon plenan de la ĝardeneto, suno, printempo, de la infano! Genuu kaj poste — ripetado de la leciono ĝis la vespero!..

Mademoiselle ree ekrigardis la horloĝon kaj surmetante la gantojn, forlasas la ekzekutejon. Sonjo surgenuas en la angulo. Trans la fenestro „popolaĉa infano“ dancas ĝojege sub la suna brilo...

Trad. J. Ch.

Z. KRASIŃSKI.

Pokalo de l' vivo.

*Multe havas viv-pokalo
Da maldolĉa vin';*

*Ni suferu, trinku longe,
Trinku ĝis la fin'...*

Trad. Czesław Kozłowski.

Ĥinaj sonoj, lingvo, hieroglifoj kaj potenco de Ĥinujo.

De GUSTAW OLECHOWSKI.

Ĥinoj ĝenerale lernas facile fremdan lingvon, sed uzas ĝin terure malbone, esceptinte, se ili instruiĝas speciale laŭ tiu direkto en Pekingo aŭ Eŭropo.

Unuflanke ĥino ekserordinare facile elparolas fremdajn por li sonojn, ĉar li mem posedas en sia lingvo tiel langorompantajn silabojn kaj vortojn, ke elparolado de plej malfacila lingvo ne estas por li malhelpajo.

Aliflanke li ne povas orienti sin en niaj eŭropaj gramatikoj, ĉar lia lingvo, kiel li mem, estas eksterordinare mirindajo. Nome vortoj en lingvo ĥina ne ricevas iajn ŝanĝojn kaj havas nek deklinacion, nek konjugacion, nek nombrojn, nek participojn, nek tempojn.

Sed tio ne sufiĉas:

Ĉiu vorto aperas kiel substantivo, tiel adjektivo kaj verbo. Ekzemple *ĉi-fan* signifas: *mangi, mango, manĝebla*; vorto *zo-sja* signifas *sidi* kaj *sidado* — depende de tio, kiel oni elparolas la vorton kaj kian lokon ĝi okupas en prepozicio. Do kiel en multaj lingvoj arianaj ni nuancas esprimatajn pensojn per fleksioj, gradacioj k. t. p., — Ĥino povas disvolvi penson nur per nombra pligrandigo de l' vortaro. Sed por alilandano lernado de lingvo ĥina estas tre penega. Mi eĉ ne pensas pri skribado, ĉar tio-ĉi estas por ni simple neatingebla. Ĥinoj lernas ĝin po dek-kelkaj jaroj. Sufiĉas diri, ke ĥina vortaro konsistas el 44,000 vortoj, do 44,000 signoj, ĉar estas konata, ke tiu-ĉi lingvo posedas nek literojn, nek eĉ silabojn, kaj al ĉiu vorto respondas skribe alia hieroglifo. Koncerne nur la ellernado de konversacio ĥina, oni devas atesti, ke ĝi estas unu el la plej malfacilaj lingvoj por paroli pro sekvantaj kaŭzoj: Antaŭ ĉio ekzistas en ĥina lingvo akcento *majora* kaj *minora*, kiel en muziko tono. Tiel ekzemple vorto „*maj*“ elparolita per akcento aŭ tono *majora* signifas *aĉeti*. La sama laŭlitere vorto „*maj*“ eldirita per akcento *minora* signifas — *vendi*. Akcento tia estas tre malfacila por eŭropa orelo. Krom tio lingvo ĥina posedas tutan amason da vortoj, ne havantaj eĉ unu sonon vokalan, kiel ekzemple vorto „*hr*“ — kio signifas *simio*, aŭ vorto „*cr*“ — kio signifas *kopeko*. Ankaŭ la sono *r* estas stranga. Ĝi memorigas nenian el niaj tiel diversaj r-oj eŭropaj, nek malmolan polan, nek parizan, nek

germanan, nek surdan anglan, — *kio elvokis, cetere tute malpravan konvinkon, ke ĥinoj absolute ne posedas sonon „r“*.

Ni renkontas krom tio en lingvo ĥina tiajn konsonantajn sonojn, kiajn vane oni serĉus en Eŭropo. Ekzistas ekzemple sono meza inter *k* kaj *t*. En nomo de ĉefurbo ĥina Pekin oni aŭdas tiun sonon, kiu estas rekte neimitebla. La elparolado de l' angla *the* estas bagatelo kompare al tiu *k-t*.

Aparte malfacilajon prezentas multo da dialektoj.

Vortoj formiĝas ofte per simpla kunigo de du, tri aŭ pli da jam ekzistantaj vortoj. Tiel ekzemple suprenomitaĵ vortoj *maj* — aĉeti kaj *maj* — vendi, kun vorto *jen* — homo, formiĝas vorton *maj-maj-jen*, kio signifas *komercisto*, aŭ laŭvorte *aĉeti-vendi-homo (aĉet-vend-homo)* k. t. s.

Krom tio ekzistas vortoj, kiuj havas 40—60 signifojn.

Ĉio tio kune liveras grandegajn malfacilajojn por alilandano.

Tamen ĉiuj eŭropanoj lernas iome kaj iel atingas eblecon interkompreniĝi kun filoj de l' Regno Meza.

Rilate al skribajo ĥina, kiel mi diris supre, ĝi konsistas el 44 miloj da signoj. Estas klare, ke kono de ĉiuj tiuj signoj donas la eblecon kompreni ĉiujn verkojn ĥinajn; tamen por legi ordinarajn presajojn, kiel ekzemple jurnalajn, sufiĉas koni du aŭ kelkajn milojn da tiuj signoj. Por kompreni teatrajn afiŝojn, surgluitajn ĉiutage en strato, sufiĉas koni kelkcentojn da hieroglifoj. Ne estas ĥino, kiu ne sciis tralegi almenaŭ kelkcent signojn, aŭ sur elpendaĵoj, aŭ sur preĝejoj kaj publikaj konstruaĵoj. Tial do oni povas diri, ke en Ĥinujo ne ekzistas analfabetoj. Oni tamen ne komprenu tion laŭ eŭropa signifo de tiu vorto, ĉar ĉe ni ĉiu, kiu konas alfabeton, povas same legi litanion al sankta Genevevo, kiel sciencajn verkojn, dum en Ĥinujo ĉiu sfero de homa penso havas aliajn signojn.

Ĝenerale por plena konatiĝo kun propra lingvo ĥino uzas dekkvin ĝis dudek jarojn da laboro, el kio devenas fakto de tre malgranda instruado de virinoj en Ĥinujo. Okazas, ke knabino dekkvar-, dekkvin-jara edziniĝas. Do

antaŭ la edziniĝo ŝi ne povas fini la lernadon, kaj poste devoj edzinaj kaj patrinaj ne permesas al ŝi komenci la studojn. Ĥinino do rezonas tiel, ke ĝenerale ne taŭgas komenci tiun komedion kaj ŝi... restas analfabeta.

Riproĉoj pri obskura konservatismo, farataj de Eŭropo al Ĥino, koncerne ilia skribmaniero, kaj konsiloj akcepti latinan alfabeton pravas nur senkritikan blindecon de Eŭropo, kiu kredas al sia supereco kaj Ĥiuscieco.

Mi povas nur kun tuta certeco diri, ke skribmaniero Ĥina estas kaŭzo de kondiĉoj de ĝia vivo kaj en la tago, kiam Ĥinujo akceptus latinan alfabeton, kio, paranteze dirante, neniam okazos, kaj kion mi tute al ĝi ne deziras, ĝi subskribus samtempe verdikton de ĝia nacia kaj literatura morto, kaj kiu scias, ĉu ankaŭ ne politika. Kaj kiel tio povas okazi, mi rakontos.

En Ĥinujo preskaŭ ĉiu provinco — kaj da ili estas deknau — parolas alian idiomon. Kvankam ili havas komunajn ecojn, de unu devenas radikoj kaj unu estas ilia karaktero, ta-

men Ĥino el *Ŝanj-Ĥun* tre malfacile komprenas sian kunregnanon el *Fu-cjan*, kaj landano de l' lasta el *Ganj-su* alie sin esprimas ol lia kuzo el *Jun-nan*.

Ĉiuj tiuj sinjoroj havas tamen unu komunan kaj unikajn literaturon skriban, esprimatan per generalaj kaj unikaj signoj. Do ĉiun verkon literaturan, aŭ eĉ simplan leteron, same skribos ĉiuj ĉi-tiuj kvar supre nomitaj regnanoj, sed ĉiu el ili laŭte alie ĝin tralegos, konforme al sia idiomo.

Do kun momento de forlago de la signoj, respondantaj al ĉiuj vortoj, kaj enkonduko de literoj, respondantaj al apartaj sonoj, en Ĥinujo aperus tiom da literaturoj, kiom estas da dialektoj, kaj de tiu tempo Ĥino el *Jun-nan* havus nenian rimedon kompreniĝi kun Ĥino el *Fu-cjan*, dum hodiaŭ li faras tion facile per skribo.

Ĥinujo disfaliĝus tiamaniere en dekelkajn tute apartajn naciojn, dum hodiaŭ ĝi formas unu grandan tutecon, nome dank' al tiuj „sovaĝaj, malsaĝaj“ hieroglifoj.

El pola lingvo tradukis Waclaw Woyde (Esp. 3984).

Konsideru!

Utopiuloj! Jen la epiteto, per kiu la homoj ordinaraĵ kutime regalias homojn kun eminentaj mensaj kapabloj. Vanta insulto! Utopioj estas bazoj de progreso. Se ni ne havus utopiulojn eĉ en la malproksima tempo de antikeco, ni loĝus en kavernoĵ kaj ne konus vestaĵon. Utopiuloĵ kreis la planoj kaj difinis la limojn de unua urbo. De noblaj revoĵ naskiĝas grandaj kaj gravaj faroj.

Anatole France.

* * *

Ĉiu nova ideo travivas tri fazojn: unue oni kontraŭbatalas ĝin, nomante la ideon — absurdo; poste oni aprobas ĝian ekziston, sed rifuzas al ĝi signifon, enfine oni konsentas kun ĝia signifo, kaj antaŭaj antagonistoj aljuĝas al ŝi la meriton de la feliĉiĝo de homaro per donaco de nova genia inventaĵo.

William James.

(El „La Movado“.)

* * *

En akcelado al egaleco ni ĉiam pensas al niaj estroj.

Henri Becque.

Fr. Nietzsche pri lingvo Internacia.

Posedo de multaj lingvoj estas malutila, ĉar naskas konvinkon, ke ni posedas iajn sciencojn kaj efektive en interrilatoĵ ĝi prezentas la homan intelekton iom trompe; ĝi nocas ankaŭ pere, kontraŭagante la akiradon de scioĵ fundamentaj. Fine ĝi estas hakilo, kiu ĉe radiko subtranĉas pli subtilan senton de lingvo patrina, al kiu ĝi alportas nekompenseblan malutilon, preparantan pereigon de la lingvo. Du nacioĵ, kiuj eldonis plej grandajn stillstojn, grekoĵ kaj francoĵ, ne lernadis fremdajn lingvojn. — Sed ĉar interrilatoĵ homaj devas fariĝi iom post iom pli kosmopolitaj, kaj ekzemple vera komercisto londona jam hodiaŭ devas interkomunikiĝi skribe kaj parole en ok lingvoj, lernado de multaj lingvoj estas malbono necesa; kiam tamen ĝi aliros al limoj ekstremaj, devigos homaron elserĉi rimedon; kaj en malproksima estonteco estos ekzistanta al ĉiuj komuna nova lingvo, komence kiel lingvo komerca, poste kiel lingvo ĝenerala al spiritaĵ interkomunikiĝoj, kaj ĝi okazos tiel certe, kiel certe ekzistos iam aera komunikiĝo

K. W.

Sir Vezey Strong.

Sir Vezey Strong, lord-major m. Londynu, jest szczerym przyjacielem Esperanta, czego niejednokrotnie dał dowody. Ten zimny, trzeźwo rozumujący dygnitarz angielski stanął w szeregach przyjaciół Esperanta, nie bojąc się narazić angielskiej opinii, surowo piętnującej wszelkie „shocking” swoich przedstawicieli.

Ostatnio podczas wizyty w Wiedniu nie pominął on okazji widzenia się z esperantystami. W dniu 11 września r. b. Sir Vezey Strong przyjął u siebie w hotelu Bristol w Wiedniu deputację wiedeńskich esperantystów i w obecności towarzyszących mu członków municypalności m. Londynu i przedstawicieli prasy wypowiedział mowę, w której zaznaczył, że jest gorącym przyjacielem idei esperanckiej. Mówił, że wierzy zupełnie, iż Esperanto w krótkim czasie opanuje świat cały. Wyraził podziw dla entuzjastycznej pracy esperantystów i życzył wytrwałości, którą bezwątpienia uwieńczy zupełny sukces.

O fakcie tym, mającym niezaprzeczenie dużą wartość dla propagandy — szeroko rozpisaly się gazety wiedeńskie.

Następnie cała angielska deputacja z lord-majorem Londynu na czele przybyła do Pragi. Nasi dzielni współlodewcy — czesi w lot skorzystali z okazji przybycia znakomitego przyjaciela Esperanta. Prof. dr. Rosicky i red. Ed. Kühnl złożyli mu wizytę, wyrażając w imieniu całej Unji czesko-esperanckiej słowa uznania i sympatji. Deputacja od czeskich esperantystów była zaproszona razem z wieloma czeskimi korporacjami na oficjalne uroczyste przyjęcie angielskiej delegacji, które się odbyło w domu Miejskim.

Sir Vezey Strong w dłuższej mowie dziękował Czechom za ich serdeczne przyjęcie.

Z mowy tej cytujemy wyjątek, który obchodzi esperantystów:

„W celu usunięcia nieporozumień w stosunkach międzynarodowych został wprowadzony w użycie język Esperanto, ażeby dopełniał — lecz nie wyłączał języki narodowe. Raport o pamiętnej konferencji pokojowej w Guildhall — został przetłumaczony na Esperanto i rozszedł się po całym świecie. Czeski Związek Esperantystów, popierany przez światłego i przewidującego prezydenta m. Pragi, wydał ilustrowany przewodnik po Pradze. Egzemplarz tej broszury był mi przysłany do Mansion House. Z książeczki tej, którą mi przetłumaczyli londyńscy esperantyści, zaczerpnąłem wiele ineresujących szczegółów i cennych informacji; przekonały mnie one, że pobyt w Pradze będzie dla mnie przyjemny i pouczający. Jestem bardzo zainteresowany propagandą tego języka, bo wierzę, że ma on praktyczne znaczenie w stosunkach międzynarodowych i urzeczywistnia ideały wzajemnej pomocy, które są właściwością całej ludzkości, bo braterstwo nie ma granic”.

Mowę tę wypowiedział lord-major przed całym Zarządem miasta Pragi i przeszło stu znakomitymi reprezentantami czeskich stowarzyszeń. Wywarła ona duże wrażenie i oddała naszej sprawie nieocenioną przysługę. Publiczność czeska urobiła sobie korzystną opinię o Esperancie, czytając dosłowny tekst tej mowy we wszystkich czeskich dziennikach.

Dr. Stanisław Schulhoř ofiarował Sir Vezey Strong'owi dwa piękne oprawne tomiki własnych esperanckich poezji. Lord-major przyjął je z zadowoleniem a następnie serdecznie podziękował autorowi listownie.

M. Cz.

KAZ. PRZERWA-TETMAJER.

Betuloj.

Ekploreto de betuloj rusta foliar'...
 Plendo fluis malproksimen al malluma mar'...
 Ekdemandis maro: — Kial ploras arboj vi?
 Mankas al vi pluvo bona, ĉu la sunradi?
 — Ni ne ploras pro sekeco, nek pro suna mank',
 Nur ĉar teron nian patran saturigas sang'.

(Laŭ muziko de Zelenŝki.)

Kraków. Trad. Juljusz Kriss.

Pri esperanta literaturo.

(Ekstrakto el parolado de s-o Edmond Privat dum la Sepa Kongreso en Antverpeno).

Kelkaj al ni riproĉis, ke ni faras literaturon en Esperanto, aliaj — ke ni literaturon ne havas. Unu la alian sin detruas tiaj kritikoj.

Kiel estus eble, ke lingvo vivu sen literaturo? Al vivanta lingvo ĝi estas ja necesa kvazaŭ la koro al vivanta homo. Literaturo estas por ĉiu lingvo la beliga centro, en kiun alfluas la sango por puriĝi kaj poste reflui en ĉiujn partojn de l' vivanta korpo. Lingvo ne povas esti laŭordone nur komerca kaj sciencan.

Amuzan kaj profunde instruan ekzemplon oni povas doni. Ĉe unua el la antaŭaj Konresoj de Esperanto — hispana junulo enamiĝis je sveda junulino bluokula kun orblondaj haroj. Post kiam la fermo de l' Kongreso malproksimen forvojaĝis ambaŭ gejunulojn, ili kune korespondadis. Svedan lingvon li ne konis nek ŝi la hispanan. Nur Esperanton ili havis komune. Sian amon la fervora junulo volis pli bele esprimi, kaj flamantajn versajojn li ekverkis en Esperanto, la lingvo de ilia amo. Esperantajn poemojn li eble neniam antaŭe vidis, sed kiel skribi proze, kiam oni amas? Poemojn al ŝi li verkis... Ĉu ankaŭ tion-ĉi ni devus malpermesi?

Sur la balkono de tiu-ĉi operejo mi vidas kelkajn eminentajn samideanojn, kiuj skeptike ripetas en si mem, repensante pri la amaso da senvaloraj versajoj, kiujn la redaktoroj de niaj esperantaj gazetoj devas jeti en la paperkorbon. Tutkore ili dezirus, ke ne ĉiu esperantisto sin kreu poeto. Efektive la versproduktado estas ĉe ni tro granda, kaj la valoraj tro maloftaj. Grandaj genioj ankoraŭ ne venis, sed tamen kelkajn talentojn ni posedas. En sia granda entuziasmo por la lingvo tro multaj volis versfaradi, kaj la perlojn ni devas serĉadi sub amasoj da neniaĵoj. Sed en ĉiu lingvo same okazas. El dekmilo da verkitaĵoj poemoj, el milo da presitaĵoj, el centoj da legataĵoj — troviĝas nur unu aŭ du veraj perloj, sed estas preferinde suferi la senvalorajn milojn kaj trovi la du perlojn, ol ne havi la milojn kaj tute ne havi la perlojn.

Ekzistas homoj, kiuj opinias, ke internacia lingvo devas esti kvazaŭ marista, sistema signaro, decidita kaj regulata de iu internacia komitato. Jardekojn kaj jardekojn povos tiuj

homoj vane laboradi. Sian celon ili ne povos atingi.

Signaron oni povas havi por esprimi kelkajn, malmultajn — jam konatajn — ordonojn aŭ alvokojn. Sed anstataŭigi tutan lingvon per signaro, tion oni nepre ne povas fari.

Kaj efektive nur signaro estas tia sistemo, kiu konsistas nur el zorge aranĝitaj vortaroj kun traduko por la diversaj naciaj lingvoj. Senvivaj literaroj restas la vortoj en tradukvortaroj. Kvazaŭ ŝtonetojn la homoj devus ilin meti unu apud la alian por traduki la vortojn de nacilingvaj frazoj. Nekredeblan eraron faras tiuj, kiuj proponas similan sistemon.

La uzado estas la sola bona vortaro, ĉe kiu el ĉiuj landoj oni povas lerni la ĝustan senco de vorto sen traduko kaj sen ia aŭtoritata decido. Saĝa lingva komitato aŭ bona vortaristo konsideras kiel plej altan sian taskon konsciencie raporti pri l' uzado por helpadi la ceterajn homojn. Ni ĉiam bone memoru, ke *la unuecon de la lingvo konservas nur la uzado*.

Ni ja vidis, ke centraj fortoj estas por Esperanto ĝia interna ideo kaj ĝia literaturo.

Por tio ambaŭ ilin atakis tiuj homoj, kiuj jaluze sed vane, provis labori por faligi nian movadon kaj mortigi nian lingvon. Nin ili riproĉis, ke estas ĉe ni tro da sentimentaleco, kaj eĉ ili okaze kuraĝis moki tiajn admirindajn fakojn de nia movado, kia estas ekzemple la servado al blinduloj.

Eĉ indignon ne meritis tiaj mokoĵoj: simpla neaŭskultado estus plej bona.

Neniam ni hontu, sed kontraŭe ni ĉiam alte fieru, ĉar nia lingvo estas tiel utila kaj tiel bela, ke per ĝi oni helpis kaj en ĝi oni ploris.

Se tio povas esti nomata sentimentaleco, tiam ni ne bedaŭru, ke ni estis sentimentalaj, ĉar ĝi certe multe pli helpis la vivon kaj bonfamon de nia lingvo, ol senĉesa kopiado kaj ĉiumonata reformado povos iam helpi la sukceson de proponita senviva sistemo.

Esperanton ni neniam konsideru kiel proponatan aferon. Ĉesu tiaj paroloj kiel: „se Esperanto sukcesos...“ aŭ „kiam Esperanto estos starigita...“

Jam sukcesis Esperanto, ĉar ĝi vivas; jam ĝi estas starigita, ĉar ĝi uziĝas.

Ni ĉesu proponi, ĉar proponante, oni ne facile konvinkas. Ni agu pli kaj pli, ni uzu la lingvon ĉiumaniere. Ni florigu kaj kreskigu nian rondon, kvazaŭ modelon por la tuta mondo.

Ankoraŭ tre malvasta, kompreneble, estas nia juna originala literaturo. Nur kelkajn dek-ojn da verkistoj hieraŭ ni havis, sed montriĝas novaj talentoj pli kaj pli ofte. Grandan taskon, tre altan rolon iam havos nia literaturo, kiam

ĝi pli kaj pli fariĝos la literaturo de l' homaro. Flanke de la nacilingvaj literaturoj, kiuj ĉiam restos pli karaj kaj pli proksimaj al la koro de l' homoj, Esperanto havos pli kaj pli sian propran ne jam okupitan lokon. Kiel ĝi faris ĝis nun, nenion detruante, sed ĉiam nur konstruante, ĝi povos eble doni al ni veran homan literaturon.

Edmond Privat.

(Laŭ „La Ondo de Esp.“)

Postkongresaj ejoj.

Pro tio, ke la parolado de *s-o Rosenstock*, represita el „The British Esperantist“, estis nur ekstrakto — ni ĉi-sube presas la paroladon, alsenditan al ni de l' aŭtoro en ĝia plena, originala formo.

Estimataj Sinjorinoj! Estimataj Sinjoroj!

En la nomo de la urbo Krakovo mi esprimas al vi nian tutkoran dankon por la granda honoro, kiun vi faris al nia urbo, decidinte soleni en ĝi la jubilean kongreson. Vi faris tufan elekton. Esperanto, produkto de pola menso, eliris el sia patrujo kiel malforta infano, kaj maturiĝinte en la eksterlando, revenas nun kun triumfo Polujon, kiu havas la feliĉon esti ĝia naskiĝejo. Sur pola tero do ni festos la 25-jaran jubileon de nia kara lingvo, por akcenti, ke Pollando donacis al la mondo tiun mirindan pacigilon de l' homaro.

Krakovo, metropolo de iama pola regno, centro de pola arto kaj scienco, fokuso de pola penso kaj kulturo, la plej pura tipo de Pollando — posedas grandiozajn vidindaĵojn. Vi trovas en nia urbo belegajn monumentojn de mezepoka arkitekturo, monumeetojn, el kiuj multaj devas esti konsiderataj kiel unikaj en Eŭropo. Vi havos ankaŭ okazon interkonatiĝi kun polaj samideanoj, kiuj vere ne devenas el la mezepoko kaj ne estas unikaj sur la kontinento, sed kiuj heredis de siaj prapatroj unu belan trajton de nacia karaktero — la famam malnovpolan gastamon. Ni faros ĉion eblan por prepari al vi vere reĝan akcepton.

Sed, ne nur la urbo mem estas vidinda; ne malpli vidinda estas ĝia ĉirkaŭaĵo. Tuj apud

Krakovo sin trovas la mondfamaj salminejoj de Wjelička, kiuj estas efektive miraklo de l' naturo. La Wjelička'aj salminejoj, vera subtera urbo, ne posedas koncerne la amplekson kaj belecon, konkurenton en la tuta mondo. Vi vidos el salo ĉarpentitajn, subterajn halojn, kolonojn, kapetojn kaj sanktulajn statuojn, kiuj ĉe lumo de fajraĵoj faras tian impreson, kvazaŭ vi estus en fabela regno.

Ne malproksime de Krakovo sin etendas majestaj montoj — la Tatroj, kun belegaj valoj, eterne neĝkovritaj montdorsoj, mirindaj lagoj kaj akvofaloj. La turistoj trovas en la Tatroj vastan kampon por siaj revoj kaj aspiroj. Li trovas krutajn, nudajn, ĉielaltajn rokojn, vertikalajn murojn, senfundajn abismojn, embuskajn fendegojn. Venu kaj admiru!

Jen parto da tio, kion nia lando al vi povas oferi. Ni streĉos ĉiujn fortojn por ebligi, ke nia kongreso estu vere solena manifestacio, sed la stampon de soleneco nur vi povas al ĝi doni. Ni ebligas — vi efektivigas. Venu do grandare, multenombre, por ke la tuta mondo povu diri, ke esperantistoj scipovas festi tion, kio estas al ili la plej kara: sian lingvon.

Se vi opinias, ke Krakovo kuŝas malproksime, vi trastudu la geografian karton kaj vi konvinkiĝos, ke nia urbo posedas preskaŭ centran situacion. Sed vi eĉ ne rigardos la karton, vi jam parkere povas konstati, ke de Krakovo al Dresdenu, Barcelono, Antverpeno, kien veturis la krakovaj samideanoj, la distanco ne estas eĉ je unu milimetro pli granda, ol de Dresdenu, Barcelono aŭ Antverpeno al Krakovo.

Ĝis la reveno en Krakovo!

Fakty.

Papież I Esperanto.

Wiadomem jest, iż papież Pius X nadesłał swoje apostolskie błogosławieństwo dla pierwszego Kongresu Esper. Katolików, który odbył się w Paryżu w roku zeszłym, obecnie takie same błogosławieństwo otrzymali uczestnicy drugiego Międzynar. Kongresu Katolików, jaki się odbył w Holandji, w Hadze.

Wszyscy uczestnicy, zainteresowani sprawami Kongresu, mieli ogromne ułatwienie, posługując się jednym językiem ogólnie rozumianym.

Nie ulega wątpliwości, że w niedalekiej przyszłości językiem wszystkich kongresów będzie Esperanto i dopiero wtenczas będą widoczne skutki tego.

Esperanto i fryzjerzy.

Oto jakie wezwanie wystosowali członkowie drugiego kongresu fryzjerów we Francji, który się odbywał w Paryżu pod przewodnictwem p. Hektora Ledoux, delegowanego przez Syndykat Fryzjerów Paryskich, wiceprezydenta Sekcji Handl. i Przem. Grupy Esper. w Paryżu:

„Ze względu na użyteczność i potrzebę języka pomocniczego tak dla stosunków międzynarodowych, jak i korporacyjnych, oraz dla wykształcenia fachowego, wzywamy fryzjerów, idących za postępem, do nauki języka Esperanto i wypowiadamy życzenie, aby Esperanto był na przyszłość językiem kongresów międzynarodowych.“

„Oni diras...“

Ekzistas du vortetoj mallongaj kaj oni elparolas ilin senpripense. Facilmovaj ili estas, flugas de buŝo al buŝo kaj neniu scias, de kie ili venas. Ili estas tiel potencaj, ke ili pravigas eĉ kalumnion kaj ne ŝarĝas homan konsciencon. Kaj tamen ĉi-tiuj vortoj pereigas honoron kaj trankvilon de familioj kaj malesperigas la korojn. Tiel malbonaj estas tiuj vortoj ke ili rabas al junularo la ĝojon, al maljunuloj pacon, al amantoj la konfidon kaj al ĉiuj la feliĉon. Tiel volonte ili estas uzataj, ke ili trovis lokon en ĉiuj domoj, en ĉiuj societoj, tiel spritaj ili estas, ke ili vivigas la interparoladon, ke per ili fariĝas silentemuloj parolantaj kaj enuigaj homoj — amuzigaj.

La vortetoj estas: „Oni diras“.

„Oni diras“, sub tiu-ĉi masko kaŝas sin fantomoj de vampira speco, kiu dum malluma nokto elsuĉas la sangon de sia ofero. Tiu terura fantomo ne nur forprenas nian sangon, sed ankaŭ nian honoron.

Se oni parolus pri efektivaĵoj kaj diris: „ĉi-tiu aŭ tiu faris tion“ — certe iu indignite kaj decide postulus pruvojn por tiuj eldiroj, — sed „oni diras“... — Kiu havas respondecon en tiu okazo? Kiu rakontis unuafoje la historieton? La mortiganta sago venas el la embusko. Ĉu estas neeble trovi rimedon kontraŭ tiu abomenaĵo? Se iam la mensogo, kalumnio, malamo, venĝemo kaj ofendita vanteco en homa koro estus anstataŭitaj per homamo, veramo, justeco kaj bonecol..

Nieznanomość przedmiotu pokrywać kpinami jest rzeczą wygodną, ale uwłaczającą wiedzy. Uczony, który naigrawa się z rzeczy możliwych — wpada w idyotyzm.

WIKTOR HUGO.

Kronikę.

Francja.

Paryż. Esperanto zdobywa sobie coraz większe uznanie w kołach lotniczych. Rocznik awjacyjny *Athmos* wydany został w 7-iu językach, między którymi znajduje się Esperanto.

— Otwarto w Paryżu popularną szkołę awjacyjną (*École d'aviation populaire*, 10, rue Maria et Louise, *Paris*). Wszelkich informacji można zasięgnąć po esperancku.

— 7-go października w obecności mera otwarto posiedzenie handlowo-przemysłowej sekcji Paryskiego Tow. Esperantystów.

— Znany dziennik „*Le Matin*“ urządził nowy konkurs języków, zapisując na listę języków i Esperanto.

— Ostatni numer *Paris-Esperanto* wylicza 73 kursy jęz. Esperanto, jakie się obecnie odbywają w Paryżu.

Niemcy.

Köthen (księstwo Anhalt). W miejscowej politechnice „*Friedrichs-Polytechnikum*“ już od dwóch lat stale funkcjonują kursy Esperanta. Obecnie przy politechnice otwarto nowy wydział inżynierów handlowych; przy egzaminach wstępnych na ten wydział jest *obowiązkowo wymagana znajomość Esperanta* w piśmie, a w mowie — Esperanto jest jednym z czterech dowolnie wybieranych języków, z których nowowstępujący muszą zdawać egzamin. Oto pierwszy wypadek oficjalnej aprobaty Esperanta w Niemczech.

Berlin-Schöneberg. Magistrat zezwolił p. Tietsch'owi na prowadzenie kursów dla uczniów szkół ludowych; zgłosiło się 100 słuchaczy.

Wrocław (Breslau). Na kilka funkcjonujących kursów języka ucześnie ogółem 155 osób.

— Kalifornijczyk p. Parrish wygłosił po esperancku dwa odczyty o Kaliforni; pierwszy zgromadził 650 słuchaczy, drugi — 400.

— Ostatni numer „*Germana Esperantisto*“ zamieszcza krótkie sprawozdania o ruchu esperanckim w 54-ch miastach Niemiec; ruch ten wyraża się

w wygłaszanych odczytach, zebraniach i kursach Esperanta.

Austria.

Baden („kurort“ pod Wiedniem). Zorganizowano tow. esperanckie; honorowym prezesem został burmistrz miasta.

Czechy — *Praga*. Do nowo-powstałego tow. esperantystów-robotników zapisało się 200 członków.

Węgry. Prezesem węgierskiego stow. esperantystów (2000 członków) został członek parlamentu — Giesswein.

Zagrzeb. Na zjeździe słowiańskich „*Sokolów*“ cieszyła się ogólną uwagą grupa esperantystów.

Anglja.

London. Brytański Związek Esperancki, liczący blisko 7000 członków, zebrał subskrypcji na 52.324 rb. na stworzenie specjalnego funduszu propagacyjnego.

— Lord-Major Sir Vezey Strong złożył wizytę esperanckiemu klubowi i wypowiedział entuzjastyczną mowę o Esperancie. Niedawno podróżował on za granicą i rozmawiał o Esperancie z głowami ukoronowanymi i zawsze spotykał się z wielkiem uznaniem dla naszej sprawy.

— Interesujący się ruchem kobiecym proszeni są o zwracanie się po informacje do „*La Internacia Ŝufragistina Butiko*“, 15, Adam-Street, Strand, *London*.

Belgja.

Spa. Odbyło się wielkie propagacyjne zebranie esperantystów (brało udział z górą *dwa tysiące* osób).

Antwerpja. Federacja spirytystów wydała esperancką broszurę (80 stron), którą można otrzymać *bezpłatnie*. Adres: Bureau Permanent d'étude des Phénomènes spirites, 8, rue des Babillardes, *Anvers*.

Stany Zjednoczone.

Członek Izby Deputowanych Barthold, prezes Północno-Amerykańskiego oddziału związku parlamentarnego, wniosł do Izby projekt prawa o wprowadzeniu Esperanta do szkół.

— Wykłady Esperanta zostały urzę-

downie wprowadzone do programu Stanfordzkiego uniwersytetu w Kalifornii.

— Na XXV Kongresie Związku Chrześcijańskiego (z górą 10,000 delegatów) w *Atlantic City*, pastor P. Anderson (red. gazety „Christian Endeavor World”) i misjonarz chiński G. H. Hubbard wygłosili mowy o Esperancie.

Brazylja.

Jak doskonale rozwija się tu nasza sprawa świadczy wymownie stale wzrastająca ilość kursów Esperanta. Ostatnio prowadzone są kursy:

w *Para* — w Instytucie „Civico-Juridico Pacs de Carvalho” i w Union Espenola;

w stanie *Maranhão* — w szkole normalnej i w Liceum;

w *Aracajn* — kurs dla gimnazjalistów — 50 uczniów; kurs w szkole „Gremio Escolar“; kurs w „Collegio Sant' Anna“;

w *Pernanbuco* — kurs w szkole „Le Citologie“;

w *Rio de Janciro* — kurs w „Lyceu de Artes e Officos“; w Związku urzędników handlowych; w wyższej szkole „Pedagogium“, — ucześniezza wielu profesorów.

Gibraltar.

Na przedstawieniu esperanckiem byli obecni między innymi: komendant twierdzy sir Archibald Hunter, admirał Pelham, sekretarz kolonji sir Evans.

Hiszpanja.

Tarragona. Odbył się II kongres esperantystów katalońskich. Na otwarciu byli obecni: prezydent miasta, prezes Izby Sądowej i delegat Ministerjum Finansów.

Rosja.

Moskwa. 8-go października odbyło się posiedzenie roczne Moskiewskiego Tow. Esperantystów. W roku sprawozdawczym towarzystwo urządziło 100 posiedzeń i miało blisko 2000 wizyt gości.

— W Kownie, Kostromie, Saratowie, Sierzpuchowie — funkcjonują kursy Esperanta.

— Ostatni numer „Ondo de Esperanto“ — wylicza 25 gazet rosyjskich (konserwatywnych i postępowych), które zamieściły przychylnie artykuły o Esperancie.

Holandja.

Haga. Szeroką i skuteczną propagandę prowadzi 5 istniejących w tym mieście klubów esperanckich.

Turcja.

Van. Założono tu grupę esperancką.

Persja.

Deputowany perskiego parlamentu Hadzi-Mirza-Waja obecnie opracowuje projekt prawa o wprowadzeniu Esperanta do szkół Persji.

— Jak donosi gazeta „Arawat“ — Esperanto jest wykładany w centralnej armeńskiej szkole w Tebryzie.

Pola Kroniko.

Wyjaśnienie.

W prasie polskiej i rosyjskiej pojawiły się wiadomości o zamknięciu towarzystwa esperantystów w Warszawie. Wiadomość ta o tyle jest prawdziwa, o ile dotyczy warszawskiej grupy esperantystów-rosjan, którą istotnie zamknięto jako oddział rozwiązanej przez władze „Rosyjskiej Ligi Esperantystów“ z centralą w Petersburgu.

„Polskie Towarzystwo Esperantystów“ wraz ze swoimi filjami jak i większość towarzystw esperanckich rosyjskich — nie mają nic wspólnego z wymienioną „Ligą“ i istnieją nadal jako organizacje zupełnie samodzielne.

Wyżej pomieniona „Liga“ założona

przed paru laty przez kapitana Postnikowa, utworzyła w niektórych miastach, między innymi i w Warszawie — swe filje, lecz nie objęła towarzystw już istniejących.

Zamknięcie „Ligi“ było konsekwencją aresztowania jej prezesa p. Postnikowa i oddania go pod sąd wojenny za sprawy nie mające nic wspólnego z Esperantem.

Zebrania „Polskiego Tow. Esper.“ odbywają się jak i dotąd w pierwszy czwartek każdego miesiąca od godz. 8 wiecz. w sali Towarz. „Uranja“, Bracka 18.

Prezes Tow.: inż. *Antoni Grabowski*, Hoża 42 m. 8, sekretarz: *dr. I. Dubrowicz*, Nowogrodzka 31.

Krakovo.

La okazonta tutmonda Kongreso en Krakovo vekas en la publiko grandan intereson kaj scivolemon: tre ofte renkontas nin demandoj pri Esperanto kaj pri la esperanta festo sur la pola tero.

La loka „Societo Esperanto“ vigle alpaŝas al la laboro, kies pruvo estas organizo de du esperantaj kursoj. La mardaj societaj kunvenoj kun diverstema kaj interesa programo are kunvenigas la societanojn.

Grandan sukceson faris Esperanto inter poŝtovicistoj: Kun permeso de la poŝtestraro s-o Jakiuczuk kondukas esperantan kurson por gepoŝtovicistoj. La kurso okazas en granda salono de la poŝtoficejo kaj estas frekventata de 100 aŭskultantoj.

Krom tio Esperanto estas instruata en Komerca Akademio.

Dank' al klopodoj de krakova societo aperis lukse eldonita ilustrita gvidlibro tra Krakovo. La libro estas ricevebla *senpage* ĉe s-o Rudnicki, str. Kopernika 17, Krakovo, Galicio-Aŭstrio — post alsendo de respondkupono.

W. G.

Akademia Esperantista Asocio en Krakovo.

Al la estraro de Krakova „Akademia Esperantista Asocio“ estas elektitaj: s-oj Juljusz Kriss, kiel prezidanto, Antoni Czubryński, Leopold Kronenberg, Andrzej Wisłocki kaj f-ino Jadwiga Mandłówna. La Asocio agas fervore inter la universitata junularo, aranĝante kursojn de nia lingvo kaj kunvenojn. La superan kurson laŭ speciala metodo gvidas s-o Kriss.

Stanisławów.

S-o A. I. Quittner sukcesis starigi kurson de Esperanto en la komerca lernejo; partoprenas 22 lernantoj.

Z prasy polskiej.

Tygodniowy dodatek do „Kurjera Polskiego“ — „Tydzień Polski“ w n-rze 42 zamieszcza kronikę ruchu esperanckiego, zaczerpniętą z naszego pisma i od siebie dodaje taką sympatyczną uwagę:

Sprawę języka międzynarodowego uważamy za bardzo doniosłą i pilną, jesteŝmy teŝ przekonani, ŝe rozstrzygną ją pomyŝlnie język dr. Zamenhofs. Dlatego z przyjemnoŝcią notujemy fakty ŝwiadczące o rozwoju Esperanta.

Varsovio.

9-an de novembro okazis en „Uranja“ monata kuaveno de Pola Esp. Societo. — S-oj Jablkowski kaj Czerwiński faris interesan dialogon por kaj kontraŭ Esperanto. La prezidanto de la Societo, s-o Antoni Grabowski legis referaton pri „Tradukado de polaj literatur-ĉefverkoj en Esperanton“ La preleganto diris, ke Esperanto diskonigas polan literaturon en eksterlando — pli ol ni tion konjektas. Tiamaniere diskonigis la nomoj de polaj literaturistoj: Gawalewicz, Gąsiorowski, Hajota, Junosza, Niemojewski, Orzeszkowa, Prus, Przybyszewski, Reymont, Sienkiewicz, Sieroszewski, Szymański, Tetmajer, Ŝeromski kaj Ŝulawski. S-o Gr. ankaŭ nomis longan vicon de noveloj kaj romanoj, tradukitaj esperanten — inter ili: „La Faraono“, „Quo vadis?“, „Marta“, „Abismo“, „Fundo de l' mizero“, „Legendoj“ k. t. p. El la drama literaturo — la mondo jam posedas: „Ne-dia komedio“ de Krasiński, „Mazepo“ de Słowacki, „A spazio“ de Ŝwiętochowski, „La neĝo“ de Przybyszewski, „Protésilas kaj Laodamia“ de Wyspiański kaj kelkdekon da komedietoj de Balucki, Fredro, Przybylski k. al. Ankaŭ la lirika poezio dank' al Esperanto estas admirata de la esperanta mondo. Estas tradukitaj multaj poezioj de Asnyk, Kopnicka, Krasiński, Lenartowicz, Malczewski, Mickiewicz, Słowacki, Ujejski, Zaleski, Ŝmichowska, kaj de la nuntempaj: Janowski, Lange, Stoński, Staff, Tetmajer.

Por interesa kaj bela referato oni dankis al s-o Grabowski per bruaj aplaŭdoj.

Enfine oni faris kompletigan elekton por ofico de societa kasisto; kiel nova kasisto estis elektita s-o A. Lipski, profesoro.

Krom tio la Societo decidis inviti Varsovion s-on Parrish, por la prelegoj pri Kalifornio.

Pri la kunveno raportis varsoviaj ĉiutagaj gazetoj: „Kurjer Polski“, „Dzień“, „Nova Gazeta“, „Gurjer Warszawski“, „Kurjer Poranny“ k. al.

* * *

7-an de decembro en „Uranja“ okazis decembra monata kunveno de P. E. S.

En la unua parto de l' programo s-o A. B. Brzostowski legis belan, entuziasmoplenan prelegon pri „Patriotismo kaj lingvo internacia“. Ni bedaŭras, ke pro manko da loko ni ne povas citi belajn pensojn de s-o B. Oni varme aplaŭdis la preleganton.

S-o Jabłkowski, citante centojn da faktoj el la sfero de praktika uzado de Esperanto, bone pruvigis, ke Esperanto pli kaj pli almitas la mondon, diversmaniere utilante al la homaro.

D-ro A. Naŭman parolis pri la temo: „Kiu estas esperantisto“ — elvokante varman kaj longan diskutadon, partoprenatan de s-o Leo Belmont, d-ro Dubrovicz, s-o Antoni Grabowski kaj aliaj.

Deklamis — s-o Czerwiński.

En fino de l' kunveno s-o Tejchfeld, vicdelegito de U. E. A., alvokis la ĉeestantojn al enskribiĝo al U. E. A. Kiel varsoviaj delegitoj oni elektis s-on Jabłkowski.

Gvidlibro tra Varsovio.

Sub aŭspicioj de U. E. A. kaj dank' al laboro de distrikta delegito d-ro W. Robin estas eldonita gvidfolio tra Varsovio. La gvidfolio enhavas: adresojn de U. E. A.-delegitoj, konsuloj, de Red. de „Pola Esperantisto“, de Prezid. de Vars. Esp. Societo, adresojn de rekomendindaj hoteloj, kafejoj, prezarojn de fiakroj, informojn pli publikaj institucioj, liston de teatroj k. t. p.

Ĉiu samideano alveturinta Varsovion trovas en la gvidfolio multajn necesajn informojn.

„Ungra“-Libro-Kalendaro por 1912 j.

La konata en Polujo kalendaro, redaktata de s-o Antoni Orłowski, literaturisto, en la socie-literatura parto enhavas longan kaj bonegan artikolon pri Esperanto, verkita de s-o Antoni Grabowski. La aŭtoro lertaplume traktas pri la historio de Esperanto, pri ĝia literaturo, movado, sukcesoj. Multaj statistikaj ciferoj konigas al vastaj sferoj de legantoj de la kalendaro nuntempan staton de Esperanto.

Ni gratulas la aŭtoron pro lia laboro (ĝi estu fruktodona!) kaj rekomendas al niaj legantoj ĉi-tiun sendube utilan kaj bezonan libron.

La esperanta vespero.

En Kamienskoje — la esperantistoj, gvidataj de nia bravega samideano s-o Radziwiński, ne nur kunvenas por interparoladi: ili kantas, ludas, deklamas, scenprezentadas! Ni ricevis la programon kaj kvadro-metre grandan afiŝon pri esperanta koncerto, kiu okazis 5-an de novembro. Varsoviaj samideanoj (ne nur varsoviaj!) alŝskultu, konsideru, kaj imitu: Referaton pri Esperanto legis s-o M. Bojanowski, Esperantistan himnon kantis la ĥoro, Rap-

sodion de List ludis f-ino Grigo, Arion de Januś el „Halko“ kantis s-o Stańcik. Polkon kaj valson ludis orkestro, „La konfeso“ de B. Radziwiński kantis la kvarteto: f-inoj Zitek, Turecka, Szadkowska kaj Jagiello, „Esperantujo“ — kantis s-o Jasencki, „Nokto“ de Czajkowski — kantis s-o Kasprzykowski. La koncerton finigis orkestr-ludado.

Post la koncerto sekvis dancoj, kiuj daŭris ĝis la 4-a horo matene.

Ni gratulas la tieajn samideanojn kaj envias al ili!

El pola gazetaro.

En n-o 47 de varsovia progresema semajna gazeto *Prawda* („La Vero“) ni trovas favoran felietonon pri Esperanto.

Kurjer Kujawski — ĉiutaga gazeto, aperanta en Włocławek, enhavis en kvar n-oj — kiel fruntan artikolon, referaton de d-o L. L. Zamenhof, nia majstro, por kongreso de rasoj en Londono. La referato estas antaŭigita de bonega artikolo de s-o R. M., nia konata pola samideano el Drezdeno.

Ni tutkore gratulas la redakcion de *Kurjer Kujawski*.

Kurjer Kaliski presis artikolon pri Esperanto s. t.: *Lord-Major de Londono kaj Esperanto*, felietonon: *Bakcioj de esperantismo* kaj aliajn malgrandajn artikolojn.

Ni gratulas la simpatian por nia afero redakcion!

Noto.

La Redakcio de „P. E.“ akceptas ĉiutage de 8-a horo vespere (telef. 204-60) enskribiĝojn por supera kaj komenca kursoj de Esperanto. Dek lecionoj kostas 1 rb. 50 kop.

La supera kurso, kondukata de s-o A. Grabowski, jam estas komencita; ĝi okazas ĉiuvendrede de la 7 ĝis 8 vespere en gimnazio de gen. Chrzanowski (Smolna 30) en la ĉambro de II-a klaso.

La komenca kurso okazos samloke, ĉiulunde kaj ĉiujarde de la 8 ĝis 9 vespere.

En la lasta momento.

Ni jus ricevis komunikon de la ĝenerala sekretario de VIII-a Kongreso, d-ro Leon Rosenstock, ke ĉiujn leterojn, koncernantajn la Kongreson, oni devas sendi laŭ la provizora adreso de la komitato:

D-ro Leon Rosenstock, Krakovo, Basztowa.

NOTO. Pro okazinta en Varsovio striko de kompostistoj — nia decembra numero malfruigis, o kio ni petas pardonon de niaj estimataj legantoj.

L a Red.

El Esperanta Mondo.

Esperanto en Persujo.

La Centra Oficejo de la Pers-Amerika Asocio por Edukado en Vaŝington, D. C., Usono, ricevis la novaĵon, ke en Persujo oni organizas diversajn studklasojn de Esperanto. Ĉe la lernejo „Tarbiat“ en Teheran — klaso de la Internacia lingvo jam funkcias. En la urboj Tabriz kaj Urmial, en Persujo oni multege interesiĝas kaj tie regas, granda entuziasmo. La Persa-Amerika Asocio por Edukado en Vaŝington liveras necesajn lernolibrojn. Ĉi-tio estas bonega komenco kaj oni esperas, ke multaj klasoj baldaŭ stariĝos en aliaj urboj persaj, ĉar la nuna majstro de la Balai'a Revelacio, Abdul Baha, ordonis al siaj tri milionoj da persaj kredantoj studi ĉi-tiun lingvon. Kaj oni scias bone, ke en la oriento religiaj devoj estas ĉiam konscie plenumataj. Amerikaj Bahajanoj ankaŭ studas la internacian lingvon.

Propono.

En la novembra numero de „La Revuo“ mi presis artikolon pri fondo de *esperantista lerno-jurnalo* por instrui al la fremduloj la francan lingvon. La enketon respondis ankaŭ areto da poloj, do mi nun ripetas mian artikolon en iom pli malgrandigita formo.

Antaŭ ol Esperanto tute almitos la mondon, utle estas koni kelkajn aliajn plej gravajn lingvojn ekz. francan, anglan, germanan.

...Kvankam ni havas jam lernolibrojn kaj eĉ lorno-jurnalojn en naclaj lingvoj, sed ili ne povas esti senriproĉaj, ĉar plej bone kompreni kaj instrui la francan lingvon povas nur franco kiel polo la polan, anglo la anglan ktp.

Sed antaŭe, ol entrepreni ion similan, oni devas scii, ĉu tiu jurnalo trovos sufiĉan subtenon, do mi petas ĉiujn legantojn skribi sub mia adreso sian opinion pri mia propono.

Ignatyce p. Mińsk gub. Edw. Rud. Gacki.

Universala manĝokarto.

S-o Ig. Tejchfeld, inĝeniero (str. Jerolimiska 82, Varsovio) eldonis sprite verkitan manĝokarton en ses lingvoj paralele: esperante, angle, france, germane, pole kaj ruse kun libera rubriko por alia lingvo, enskribebla

laŭbezone. La manĝokarto prezentas seslingvan vortareton de 174 vortoj plej necesaj kaj uzataj en restoracioj kaj kafejoj — do nomoj de manĝaĵoj, trinkaĵoj, manĝilaro kaj cet. bezonaĵoj. La karto povas esti tre praktika utilaĵo por vojaĝantaj samideanoj kaj tial ĝi estas vere rekomendinda.

Internacia Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj.

Dum la VII-a Kongreso fondiĝis nova unuiĝo. Jen — la principaj celoj de nova organizaĵo:

- 1) *Interkonatigi* esperantajn verkistojn el la plej diversaj landoj;
- 2) *Reciproke helpi* ilin per konsiloj;
- 3) Koncerne al publikado de esperantaj verkoj — *evitigi* la duoblan tradukon aŭ eldonon de la sama verko kaj ankaŭ evitigi samtempan aperigon de du similaj verkoj aŭ laboraĵoj.

La organizintoj aldonas: „Ni trioble utilos al la esperantistoj. La tradukantoj trovos ekzamenantojn por siaj tradukaĵoj; al la eldonistoj la „Unuiĝo“ ebligos eldoni bonajn, interesajn verkojn kaj la legantoj tiam kun intereso kaj plézuro ĉiam legos kaj per bona legmaterialo ĉiam pliperfektigos en nia kara lingvo!“

La enskribiĝo kostas 1.00 ₰; jara kotizo — 0.50 ₰. La organo de la „Unuiĝo“ estas la „Oficiala Gazeto“. La adreso de la administracio: Dresden, Nicolaistr. 18.

Grava afero.

La Esperantista Centra Oficejo decidis reeldoni la *Tutmondan Aldonon al la Jarlibro Esperantista*, kiu aperis ĉiujare (de 1905), kun bedaŭrinda interrompo en la jaro 1911.

Ĉar ne ekzistas preciza statistiko de ruslandaj esper. organizaĵoj, la Centra Oficejo tre petas ĉiujn societojn kaj grupojn de la *tuta* Ruslando senprokraste sendi al s-o B. Kotzin (Москва, Лубницкий проездъ, д. Страховскихъ кв. 34, Б. П. Коцку) la sekvantajn informojn: 1) la plenan titolon de ĉiu societo kaj grupo, 2) la adreson de ĝia oficiala kunvenejo kaj 3) la nomon kaj adreson de la prezidanto kaj sekretario.

Bonvolu skribi tuj, ĉar la Jarlibro aperos en januaro.

Nota: La fermitaj filioj de R. L. E. ankaŭ respondu kaj sendu la samajn informojn. Iliaj adresoj estos presitaj kun aparta signeto.

Bibliografio.

Goethe, Hermano kaj Dorotea (Hermann und Dorothea). Eposo idilia, esperantigita el germana Lingvo de *Benno Kuster*. 1911. Central-Verlag für Esperanto und Stenographie. Magdeburg, Kaiser Friedrichstr. 1. Paĝ. 86.

La suprenomita Esperanto-firmo eldonis Hermanon kaj Doroteon kiel n-ron 1 de Internacia Mondliteraturo. Ĉu ĝi povis fari pli bonan elekton? Certe ne. La klasika verko de plej granda germana poeto bezonas nek laŭdon nek rekomendon. Ankaŭ pri ĝia enhavo ni ne bezonas paroli. Preskaŭ ĉiu inteligenta homo legis ĝin, se ne en originalo, do almenaŭ en sia nacilingva traduko. En Polujo ni posedas ekzemple bonegan, heksametran tradukon de Jenike. Tamen ni estas certaj, ke relego de Hermano kaj Doroteo en lingvo esperanta estos por ĉiu samideano vera ĝuo, ĉar s-o Kuster kun granda talento rekreas ne nur la sencon, sed la formon kaj la poezion ĉarmon de l' originalo, kaj li pruvas denove, kiel bonege nia Esperanto taŭgas por transdono de plej delikataj nuancoj de homa penso, esprimita en iu ajn lingvo.

Al la „Internacia Mondliteraturo“ ni deziras tutekore plej bonan sukceson, ne nur moralan sed ankaŭ materialan, por ke la nombro de ĝiaj volumetoj egaligu baldaŭ al tiu de la Reklama Universal-Biblioteko.

A. G.

Libro de Kantoj de Heinrich Heine. Unua serio. 10-spesdeka Biblioteko Esperantista № 3. 1911. Esperanto-Propaganda Instituto. Leipzig. Paĝ. 24.

Heine estas la favorata de ĉiuj sentemaj por poezio koroj. Liaj kantoj estas veraj perloj de la tut-monda liriko; ilia ĉarma muziko, pli-altigata ankoraŭ per melodioj de geniaj komponistoj, neniame ĉesos ravi la aŭskultantaron de artistaj koncertoj. Ni do ne miras, ke Heine estas tradukita kaj tradukata en ĉiujn lingvojn de l' mondo.

Ankaŭ la en 1887 novenaskita Esperanto ekkantis en sia lulilo (unua lernolibro de d-ro Zamenhof) la Heine'an kanton: „En sonĝo princlnon mi vidis“. En la „Dua Libro“ s-ro L. Belmont plendis kun Heine: „Al brusto, al mia — ho, ĝi min doloras!“ Poste esperantigis aliajn kantojn: Kanaloŝy-Lefler, Kofman, Christaller, Desmairons, Ley, Meier, Sviridon. Ŝefer kaj aliaj. — Nun el diversaj fontoj ko-

lektis ilin s-ro Karlo Steier, direktoro de la enterprenema „Esperanto-Propaganda Instituto“ kaj eldonis en formo de bela libreto, kiun baldaŭ sekvos serio dua. Ĉu la perlareto bezonas rekomendon?

A. G.

Kelkaj vortoj pri Teosofio de s-ino Diou-Trouillon, Paris, Presa Esp. Soc., 33, rue Lacépède. Prezo 0,25 fr. (S 0,10); paĝ. 15.

La aŭtorino tre koncize kaj bonstile pri-traktis la interesan demandon pri Teosofio — filozofie-religia ideo, kies anoj pli kaj pli multiĝas sur la vasta kontinento de Eŭropo kaj Ameriko.

Por karakterizi la ideon de Teozofio ni citas jenajn vortojn de l' aŭtorino:

„Teosofio ne estas aparta religio, ĉar ĝi ne altrudas kredon, ĝi forpelas de si neniun, ĝi estas neŭtrala, paca, ama grundo, sur kiu ĉiuj povas apudesti, sintezo de ĉiuj religioj, filozofioj, kiel Esperanto estas sintezo de diversaj lingvoj, kunigante ĉiujn alilingvulojn. Teosofio estas do la Esperanto de ĉiuj opinioj; ni povas kuniĝi en ĝi, laborante por la ĝenerala bono, farante grandegan rondon familian, altigante ĉielen la okulojn, la spiritojn kaj la korojn.“

Réponse à quelques objections — par M. Rollet de L'Isle, Paris, Esperantista Centro-Oficejo — Eldono de la „Comité d'Action Esperantiste de France“.

Pro la apero de „Ido“ — esperantistoj bezonas kontraŭbatali la riproĉojn, kiujn idistoj faras al Esperanto. La aŭtoro de la suprecita broŝuro kunigis ĉiujn-ĉi riproĉojn, analizas ilin tre fundamente kaj kontraŭbatalas tre lerte, aplikante ofte la logikon de idistoj mem, do kontraŭbatalas ilin per idistaj argumentoj.

Interalie li atentigas kaj refutas la reformojn, postulitajn de la fama „Delegitaro por la alpreno de la helpa lingvo internacia“.

La aŭtoro konkludas, ke Ido estas la plej bona pruvo, ke Esperanto estas pli perfekta, do „se Ido ne ekzistus, oni devus ĝin krei“.

La broŝuro de M. Rollet de L'Isle meritas, ke ĝi estu plej disvastigita inter esperantistoj kaj tiucele ĝia esperanta traduko, laŭ nia opinio estas tre dezirinda.

Bejot.

Esperanta Ŝir-kalendaro por 1912 J., eld. de Central-Verlag für Esperanto und Stenogra-

phie, Magdeburg, Kaiser Friedrichstr. 1, prezo 1 *S*, kun la bindilo 1.25 *S*.

Jen estas tre bona, originalmaniera lernilo por germanoj: ĉiu tagfolio de kalendaro prezentas per si karton de esperanta legolibro; ĉiuj folioj kolektataj dumjare en la specialan bindilon, formas en fino de la jaro 366 folian volumon. La Esperanto-kurso (germane) estas tre lerte verkita kaj la bonlingva kaj interesa legmaterialo, konsistanta el ra-

Noto. Recenzoj pri la aliaj ricevitaj libroj aperos en la venonta n-ro de „P. E.“.

kontoj, paroladoj, anekdotoj, poemoj — legataj ĉiutage dum la tuta jaro, igos la leganton perfekta esperantisto.

La eldonejo intencas liveri je la sama malalta prezo similajn kalendarojn en ĉiu alia lingvo, se nur troviĝos persono, kiu tradukos aŭ verkos similan kurson en sia nacia lingvo kaj povos garantii sufiĉan intereson inter la esperantistaro de sia lingvo por ebligi la disvendon de almenaŭ malgranda eldono.

Revuo de la Gazetoj.

(27|X) **Espero Katolika** (Oktobro). — Resuma raporto de II-a Int. Kongr. de Katolikoj.

(30|X) **Universo** (X-a kajero).

(30|X) **Norvega Esperantisto** (Oktobro) — Kristiania, Pilestraedet 42. — Ni kore salutas nian kolegon, kiu ripozinte 7 monatojn, komencos sendube fervore servi al nia afero.

(30|X) **La Kroniko** (n-oj 2–3 kaj Oktobra).

(31|X) **Eŭro Esperantista** (Oktobro).

(31|X) **Sarta Stelo** (Junio).

(31|X) **Juna Esperantisto** (Oktobro).

(1|XI) **Germana Esperanto-Gazeto** (29 Okt.). — Traduko de „Lupo, hundoj kaj homoj“ de A. Dygasiński, tradukis Br. Kuhl.

(1|XI) **Welt-Post** (Monda Poŝto) (25 Oktobro).

(1|XI) **Belga Esperantisto** (Sept.—Okt.).

(1|XI) **Paris-Esperanto** (Oktobro).

(1|XI) **Esperanto** (20 Okt.).

(1|XI) **Le Monde** Esperantiste (Okt.).

(3|XI) **Internacia Socia Revuo** (Novembro).

(3|XI) **Amerika Esperantisto** (Okt.). — La kongresa raporto kun belaj portretoj kaj grupoj.

(3|XI) **Dia Regno** (Nov.).

(4|XI) **La Revuo** (Nov.).

(6|XI) **La Marto** (20 Oktobro).

(6|XI) **Kaukaza Esperantisto** (Sept.).

(6|XI) **Gazeto Hispana** (Oktobro).

(6|XI) **Itala Esperantisto** (Okt.). — Red.: 13, Salita Pollainoli, Genova. La tuta n-o redaktita itale — por propagando.

(7|XI) **Fervoja Esperantisto** (Okt.).

(7|XI) **Lingvo Internacia** (Aŭgusto—Sept.). — Kongresa numero.

(7|XI) **Germana Esperantisto** (Novembro).

(10|XI) **La Dek-Sepa** (Nov.).

(10|XI) **Bulletin Officiel** (Nov.).

(10|XI) **Antaŭen Esperantistoj** (Majo kaj Junio)

(10|XI) **La Movado** (Nov.).

(10|XI) **The British Esperantist** (Nov.).

(13|XI) **Kataluna Katoliko** (Oktobro).

(13|XI) **Le Phare Sténographique** (Nov.).

(14|XI) **Paris-Esperanto** (Nov.).

(14|XI) **La Ondo de Esperanto** (Nov.).

(14|XI) **Germana Esperanto-Gazeto**. — 3, 10, 17, 24 Septembro; 1, 8, 15, 22 Okt.; 5, 12 Novembro.

(14|XI) **Esperanto** (5 Nov.). — Aldono: „La Propagandisto“.

(17|XI) **La Holanda Pioniro** (Nov.).

(17|XI) **Kataluna Esperantisto** (Okt.—Nov.).

Konkursoj kaj problemoj.

La prelego.

Je anoncita de ni konkurso por plej bona prelego pri Esperanto ni ricevis kvar laborojn. Du el ili ni juĝis kiel plej bonaj.

La I-a premio (30 rb.) estas aljuĝita al la laboro subskribita „Estinto“ — la aŭtoro s-o *Kazimierz Wasilewski*.

La II-an premion (20 rb.) ricevis la laboro sub devizo „Nerlmarkita ĝis nun subtila ĉeno“ — la aŭtoro s-o *Zygmunt Greffkowiez*.

La laboroj estos presitaj en kelkaj ekzempleroj kaj uzeblaj por la prelegoj.

La konkurso pri „je“.

Oni sendis al ni multajn laborojn — ofte eĉ trapasantajn limojn de nia konkurso. Kvankam pro manko da loko ni en ĉi-tiu n-ro ne povas citi ekzemplojn de difinitiva uzado de prepozicio „je“ — tamen ni aljuĝas du premiojn: al s-o Chankowski el Nowo-Minsk kaj al s-o Jan Kaszycki el Grzegórzki (Galicio).

Humorajoj.

(El la libro „La plej bonaj spritaĵoj“ — vidu „Bibliografion“.)

Koncliza testo.

La virinoj malpliigas nian doloron, duobligas nian ĝojon kaj triobligas niajn elspezojn. Ili vivul

Inversa proporcio.

Ju pli malnova fotografiaĵo, des pli juna vizaĝo.

Infana deziro.

Patro. Kiam nun baldaŭ venos la cikonio-kara fileto, kion vi deziros, frateton aŭ fratineton?

Fileto. Se tio al vi estas egale, kara patro, mi preferus balancan ĉevaleton.

Distreco.

— Sed sinjoro profesoro, vi prenas la rostajon per la fingroj!

— Ho, pardonu, mi pensis, ke ĝi estas spinaco.

Programetilo.

Per la eniro de la sinjoro urbestro — la best-ekspozicio estas malfermita.

* * *

La tria — plej modesta.

En unu malgranda urbo, ĉe unu strato lokigis tri fotografejoj. Ĉe la eniro en la unuan oni legis:

Ĉi-tie estas fotografejo plej bona en la urbo.

Sur la pordo de la dua — estis anoncita:

Ĉi-tie estas fotografejo plej bona en la mondo.

Kaj super la eniro de la tria — estis skribita:

Ĉi-tie estas fotografejo plej bona ĉe ĉi-tiu strato.

La kolorŝanĝanta ĥameleono.

Unu amerikanino rakontas al la dua:

— Imagu al vi, kia malfeliĉo: mi havis mirindan ĥameleonon. Kiel bele ĝi respeguladis kolorojn! Foje, ĉe la tablo unu sinjorino submetis al ĝi verdan drapon — ĝi fariĝis verda, la dua submetis la ruĝan — ĝi fariĝis ruĝa, — sed la tria havis bedaŭrindan ideon kaj submetis al la ĥameleono pecon da skota, multkolora kvadrumita drapo — kaj kompatinda besteto krevis, ne povante elteni la skotkoloraĵon.

Mark Twain.

Respondoj de la Redakcio.

Al s-o Tyminski en Vars. Ni kore dankas.

Al s-o J. Kriss en Krakovo. Vian versaĵon ni presos en la proksima n-ro. Ni dankas.

Al s-o Wł. Grabowski en Krakovo. Ni dankas.

Al s-o Janusz Groszkowski. La alsendita fragmento el „Si, la tria“ estis iam presita en la alia gazeto. Ni ne povas uzi ĝin.

Al s-o Jujan Tuwim en Łódź. Ni ankoraŭ ne ricevis vian lastan tradukon; bonvolu sendi ĝin!

Al X. Y. Z. en Łódź. Politikaj kaj religiaj konvinkoj de niaj kunlaborantoj kaj korespondantoj — estas por ni indiferentaj. Ni ŝatas ilin laŭ ilia talento.

Al kelkaj. La personaro de la komitato de la Oka ankoraŭ ne estas al ni konata. Ĉiujn kongresajn komunlokojn ni prosos en „Pola Esp.“ — laŭ ilia ricevado de la kongresa komitato.

Anoncoj.



Rusuja reprezentado de „Le Monde Espérantiste“, Cz. Kozłowski (Malaja Vladimirskaĵa 26, Kiev) vendas *malnovajn kolektojn* po: (luksa) 1 r. 45 k. (anst. 1.60), (simpla) 85 k. (a. 1 r.); abonigas po: (luks.) 1.45 (a. 1.60), (simpl.) 90 k. (a. 1 r.); simplaj n roj aĉeteblaj ponumere; por

sendkostoj aldonu 10%; estas akceptataj — *anoncoj, manuskriptoj.*

Tadeusz Ficowski (Ruslando, Kiev, Malaja Vladimirskaĵa 26) korespondadas pri demando de L. I. kaj pri aktualaj esperantaj temoj.

Istego znaczenia (np. *ĝoji je tio* cieszyć się z tego; *malsana je la okuloj* chory na oczy; *enuo je la patrujo* tęsknota za ojczyzną i t. p.). Jasność języka wcale wskutek tego nie szwankuje, albowiem w tym razie wszystkie języki używają jakiegokolwiek przyimka, byle go tylko zyczaj uświęcił; w języku zaś międzynarodowym sankcya we wszystkich podobnych wypadach nadana została *jednemu* tylko przyimkowi *je*. Zamiast przyimka *je* używać też można biernika bez przyimka *tan*, gdzie nie zachodzi obawa dwuznaczności.

15) Tak zwane wyrazy „cudzoziemskie“ t. j. takie, które większość języków przyjęła z jednego obcego źródła, nie ulegają w języku międzynarodowym żadnej zmianie, lecz otrzymują tylko pisownię języka Esperanto; przy rozmaitych wszakże wyrazach jednego źródłosłowu, lepiej używać bez zmiany tylko wyrazu pierwotnego, a inne tworzyć według prawideł języka międzynarodowego (np. *teatro* — teatr, lecz teatralny — *teatra*).

16) Końcówkę rzeczownika i przedimka można opuścić i zastąpić apostrofem (np. *Vagner'* zam. *Vagnero*, *de l' mondo* zam. *de la mondo*).

Słowa pochodne.

Z każdego pierwiastka w języku Esperanto można zgodnie z zasadami gramatycznymi i prawidłami formować sobie wiele wyrazów pochodnych. Dzięki temu słownik niezbędny do potocznej rozmowy, może być zredukowany do rozmiarów minimalnych. Ażeby z jednego wyrazu formować inne wyrazy, posilkujemy się:

1) Końcówkami gramatycznymi: np.: *koleri* gniewać się, *kolero* gniew, *kolera* gniewny, *kolere* gniewnie, *mi koleras* gniewam się; *morti* umierać, *morto* śmierć, *morta* śmiertelny, *mortinto* nieboszczyk; *tuj* zaraz, *tuja* natychmiastowy; *paroli* mówić, *parolo* mowa, *parolanto* mówca i t. p.

2) Łączeniem słów; np.: *eniri* wchodzić (*en* w, *iri* chodzić), *eliri* wychodzić (*el* z, wy...), *aldoni* dawać (*al* do *doni*, dawać); *ŝvit-banĉjo* łaźnia (*ŝviti* pocić się, *banĉjo* łaźnia); *vaporŝipo* parostatek (*vapor'* para, *ŝip'* okręt).

3) Podawaniem do pierwiastków prefiksów (przybranek) i sufiksów (przyrostków), które mają znaczenie oddzielnych słów; każdy z nich ma swoje określone znaczenie i znajduje się w słowniku.

PREFIKSY.

mal — oznacza wprost przeciwnieństwo, np.: *bona* dobry, *malbona* zły („nie dobry“ tłumaczy się *ne bona*), *estimi* szanować, *malestimi* pogardzać, *bela* piękny, *malbela* brzydki, *beni* błogosławić, *malbeni* przeklinać.

bo — powinowactwo, np.: *patro* ojciec, *bopatro* teść, *bopatrino* teściowa, *ŝwiekra*, *frato* brat, *bofrato* szwagier, *filino* córka, *bofilino* synowa.

ge — dwoje osobników różnej płci, np.: *patro* ojciec, *gepatroj* rodzice, *mastro* gospodarz, *gemastroj* oboje gospodarstwo.

ek — początek lub krótkotrwałość, np.: *kanti* śpiewać, *ekkanti* zaśpiewać, *brili* błyszczeć, *ekbrili* błysnąć. (Porów. sufiks *ad*).

re — zwrot, powtórzenie. np.: *iri* iść, *reiri* wrócić, *doni* dać, *redoni* oddać, *reveni* powrócić.

dis — roz-, np.: *jeti* rzucić, *disjeti* rozrzucić, *disdoni* rozdać.

SUFIKSY.

in — oznacza rodzaj żeński, np.: *patro* ojciec, *patrino* matka, *frato* brat, *fratino* siostra, *koko* kogut, *kokino* kura, *bovo* wół, *bovino* krowa.

id — dziecię, potomek, np.: *hundido* pies, *hundido* szczenię, *koko* kogut, *kokido* kurczę, *bovido* cielę.

vir — oznacza płeć męską, np.: *ĉevalo* koń, *ĉevalviro* ogier, *walĉ*, *virhundo* pies, samiec.

an — członek, mieszkaniec, np.: *regno* państwo, *regnano* obywatel, *vilago* wieś, *vilagano* wieśniak, *Varsoviano* Warszawianin.

ul — osoba z pewnym przymiotem, np.: *malsaĝa* głupi, *malsaĝulo* głupiec, *riĉa* bogaty, *riĉulo* bogacz.

ist — zajmujący się pracą, rzemieślnik, specjalnością, np.: *laboro* praca, *laboristo* robotnik, *boto* but, *botisto* szewc, *lavi* prać, *lavistino* pracznia, *kuraci* leczyć, *kuracisto* lekarz, *ŝteli* kraść, *ŝtelisto* złodziej.

estr — zwierzchnik, np.: *ŝipo* okręt, *ŝipestro* kapitan okrętu, *regno* państwo, *regnestro* panujący.

ar — zbiór, np.: *arbo* drzewo, *arbaro* las, *ŝtupo* stopień, *ŝtuparo* schody, *vorto* wyraz, *vortaro* słownik, *militistaro* wojsko.

er — cząstka zbiorowej całości, np.: *sablo* piasek, *sablero* ziarniko piasku, *fajro* ogień, *fajrero* iskra.

ec — przymiot jako oddzielne pojęcie, np.: *bela* piękny, *beleco* piękność, *bona* dobry, *boneco* do-

broć, *virino* kobieta, *virineco* kobiecość, *amiko* przyjaciel, *amik-ecco* przyjaźń.

aj — rzecz z określonym charakterem lub produkt z danego materiału, np.: *malnova* stary, *malnovaĵo* starzyzna, *fruktaĵo* coś zrobionego z owoców.

il — narzędzie, np.: *haki* rąbać, *hakilo* siekiera, *knudi* żyć, *kuadrilo* igła, *tondi* strzyżać, *tondilo* nożyce.

ing — przedmiot, służący do obsady innego przedmiotu, np.: *kandelo* świeca, *kandelingo* świecznik, *plumo* pióro, *plumingo* obsadka.

uj — rzecz zawierająca..., roślina wytwarzająca..., kraj, np.: *cigaro*, *cygaro*, *cigarujo* cygarnica, *pomo* jabłko, *pomujo* jabłoni, *polo* Polak, *Polujo* Polska.

ej — miejsce do pełnienia danej czynności, np.: *kuiri* gotować, *kuirejo* kuchnia, *preĝi* modlić się, *preĝejo* kościół, *lernejo* szkoła.

et — zdrobniałość lub zmniejszenie stopnia przedmiotu, np.: *monto* góra, *monteto* górka, *wzgorek*, *ridi* śmiać się, *rideti* uśmiechać się, *dormi* spać, *dormeti* drzemać.

eg — wzmożenie się co do wielkości lub co do natężenia, np.: *porde* drzwi, *pordego* brama, *pluvo* deszcz, *pluvego* ulewa, *varma* ciepły, *varmega* gorący.

ig — czynić czem, jakim, skłaniać do czego, np.: *pura* czysty, *purigi* czyścić, *morti* umierać, *mortigi* zabijać, *edzigi* żenić.

iĝ — stawać się, np.: *pala* błądy, *paligi* blednąć, *fianĉo* narzeczony, *fianĉigi* żarzyć się, *al* do, *aligi* przyłączyć się.

ind — godzien, wart, np.: *kred* wierzyć, *kredinda* wiarogodny, *laŭdi* chwalić, *laŭdinda* godny pochwały, *memori* pamiętać, *memorinda* godny zapamiętania.

abl — możliwy, np.: *fleksi* giąć, *fleksebla* giętki, *povi* mózdz, *po-vebla* możliwy.

em — skłonność, np.: *kredi* wierzyć, *kredema* łatwowierny, *ŝpari* oszczędzać, *ŝparema* oszczędny.

ad — częstotliwość lub trwanie, np.: *iri* iść, *iradi* chodzić, *esti* być, *estadi* bywać. (Porównaj: *ek*).

ĉj — zdrobniata imiona własne męskie, np.: *Petro*, *Piotr*, *Peĉjo* Piotruś, *Jaĉjo* Jaś.

nj — zdrobniata imiona własne żeńskie, np.: *Mario* Marya, *Manjo* Mania, *Helenjo* Helenka.

um — nie ma określonego znaczenia i używa się w tych razach, gdy inny sufiks nie dość określiłby wyraz dany, np.: *plena* pełny, *plenumi* spełnić.

Ćwiczenia — Ekze coj.

Zdanie powinno być ułożone logicznie, jasno i zrozumiale: jest to jedyna zasada składni esperanckiej.

Zaimki dzierzawcze. Słowa zwrotne.

kuri bieć, lecieć, vespero wleczyć, ĉu czy, edzo małżonek, montri pokazywać, nova nowy, vesti odziewać ubierać, mem sam, zorgi troszczyć, starać się, gardi strzedz, gasto gość, akompani towarzyszyć, ĝis do, aź, do, serĉi szukać, pupo lalka, forgesi zapominać, facila łatwy.

Li amas min, sed mi lin ne amas. — Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi. — Diru al mi vian nomon. — Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. — Venu al mi hodiaŭ vespere. — Mi rakontos al vi historion. — Ĉu vi diros al mi la veron? — La domo apartenas al li. — Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato. — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas liajn (infanojn). — Montru al ili vian novan veston. — Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. — Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas. — Miaj fratroj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratroj eliris kun la gasto el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. — Mi jam havas mian ĉapelon, nun serĉu vi vian. — Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis ŝin en sia ĉambro. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon.

On lubi mnie, ale ja go nie lubię. — Chciałem go bić, ale on uciekł ode mnie. — Powiedz mi twoje imię. — Nie pisz do mnie takich długich listów. — Przyjdź do mnie dziś wieczorem. — Opowiem ci historję. — Czy powiesz mi prawdę? — Dom należy do niego. — On jest mój stryj, gdyż mój ojciec jest jego bratem. — Pan Piotr i jego żona bardzo kochają moje dzieci; ja także bardzo kocham ich dzieci. — Pokaż im twoje nowe ubranie. — Ja kocham siebie samego, ty kochasz siebie samego, on kocha siebie samego i każdy człowiek kocha siebie samego. — Mój brat powiedział Stefanowi, że kocha go bardziej, niż siebie samego. — Troszczę się o nią tak, jak troszczę się o siebie samego, lecz ona sama wcale się nie pilnuje. — Moi bracia mieli dzisiaj gości; po kolacji nasi bracia wyszli z gośćmi ze swego domu i towarzyszyli im do ich domu. — Ja mam już swój kapelusz; teraz ty szukaj swego. — Ja myłem się w swoim pokoju, ona w swoim. — Dziecię szukało swej lalki; ja pokazałem dziecku, gdzie leży jego lalka. — Nie zapomina się łatwo swojej pierwszej miłości.

La feino. — Wieszcza.

(Dailrigo)

La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj.

(Ĉiag dalszy)

Nieszczęśliwe dziecię opowiedziało jej naiwnie wszystko, co jej się zdarzyło, i, gdy mówiła, wypadło z jej ust mnóstwo dyamentów.

Jako najlepszy podręcznik do nauki Esperanta dla początkujących poleca się:

Gramatyka i ćwiczenia L. L. Zamenhova, wyd. Arcta 25 k.

Słownik esperancko-polski na jednym arkuszu . 5 k.

„Do dalszej nauki polecamy:

Fundamenta Krestomatio L. L. Zamenhova . rb. 1.40.

Większy słownik polsko-esper. A. Grabowskiego rb. 1.60.

Obszerny słownik esper.-polski S. Czarnowskiego rb. 0.60.

Gramatyka języka Esperanto A. Zakrzewskiego rb. 0.80.

Unua Legolibro d-ra Kazimierza Beina . . . rb. 0.75.

Kondukanto (Przewodnik) A. Grabowskiego rb. 0.90.

„Esperantysta Polski“, miesięcznik w języku polskim i esperanckim, rocznie z „Dodatkiem literackim“ z przes. poczt. . . . rb. 2.50.

Powyższe książki nabywać można za pośrednictwem Adm. „Esperantysty Polskiego“, Warszawa, Hoża № 20.

Jam Aperis:

„ANTAŬEN KUN KREDO!”

Literatura Jarlibro de „P. E.” por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.” 0,50 Sm.
„ ne abonantoj 1,00 Sm.

mendebila en la Administracio de „P. E.”, Hoża 20, Varsovio.

La enhavo: *Historiozofio de lingvo internacia* de St. A. Dobrzański; *Mia poŝhorloĝo*, novelo de M. Konopnicka, trad. Kabe; *Par*, nov. de J. Źuławski, trad. Wł. Grabowski; *Sommo-Sierra*, fragm. el „Uragano” de Wł. Gąsiorowski, trad. D-ski, *En krepusko*, poezio de Staff, trad. Julian Tuwim; „*La ĝemo de l’vivo*”, el „Pan Graba”, de E. Orzeszkowa, trad. M. Czerwiński; *Libroj de Profetoj*, filozofiaj poemoj de A. Lange, trad. A. Grabowski; *Fabelo pri homo feliĉa*, nov. de J. Źuławski, trad. M. Czerwiński; *Nalo kaj Damayanti*, el sanskrito trad. A. Lange; *Pluvo autuna*, poemo de Staff trad. Julian Tuwim; *En autuna vespero*, nov. de T. Konczyński, trad. E. Gacki; *Defendo de Phono*, nov. de Groller; trad. G. C.; *La arlekeno*, nov. de Juliusz Korczak, trad. Bejot; *Al mokantoj*, artikolo de St. A. Dobrzański.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo skribita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

Od Administraci „Esperantysty Polskiego”.

Uprasza się pp.: prenumeratorów o zawiadamianie Administracji „Esp. Pol.” (Hoża 20) o zmianie adresu. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem niezakomunikowania nowego adresu.

Čłonkowie „Pols. Tow. Esp. (Warsz.)”, życzący sobie w 1912 roku otrzymywaĆ Esp. Pols.” raczą go zaabonować w naszej Administracji (Hoża 20), lub za pośrednictwem księgarń. Prenumerata roczna wynosi 2 rb. 50 kop. wraz z „Dodat. Liter.”

Ze wszelkimi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona prenumerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenumeratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Adm. „Esp. Pols.”

ESTAS MALFERMITA POR LA JARO 1912
ABONO AL LA GAZETO

„LA ONDO DE ESPERANTO.”

(laŭ la adreso: Moskvo, Rusujo, Tverskaja, 26).

Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado „La Ondo” senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 n-roj (16—20 paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de s-ino M. Sidlovskaja ĉefverkon de rusa literaturo:

„Princo Serebrjanij” de Tolstoj.”

(352 paĝa), grandformata libreĝo, kies prezo por la neabonantoj estos afrankite Sm. 1,60).

Literat. konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Beletristiko origin. k. traduk. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Koresp. tutmonda (postk. ilustr.) La abonpagon (2 rubl.—2,120 Sm.) oni sendu al „Librejo Esperanto” (26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj.

En administracio de „Pola Esper.”
estas aĉeteblaj

Kolorig. Portretoj de nia Majstro

D-ro L. L. Zamenhof

Sur poŝtkartoj laŭ originala verko de konata pentristo nia fervora samideano

AUGUST MASKE. Prezo 5 kop.

Al aĉetontoj de pligranda kvanto — rabato.

!! BELGAJ KAJ PERFEKTAJ !!

Krajonoj Kun pintigilo kaj Magazeno Galalito
el diverskolora

„SAMIDEANO”

Ĉefrepresentanto k. vendanto por esperantistaro
SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

Krajono — 50 Sd.

Plumkrajono — 60 Sd.

Por Societoj k. vendistoj — rabato.

La MOVADO

Monata Universala Gazeto por Propagando, Informo, Komercio k. t. p. Redaktata france kaj esperante.

Abono:

jare 1.10 Sm.;

lulsa eldono 1.80 Sm.

REDAKCIO-ADMINISTRACIO

31, B^d S^t. - Marcel, Paris

Direktoro: *Emile Houbart.*

LINGVO INTERNACIA

(fondita en jaro 1895)

Centra organo de la Esperantistoj eliranta post la 15-de ĉiu monato.

Formato 13 $\frac{1}{2}$ × 20 $\frac{1}{2}$ cm.;

ĉiunumere 48 paĝoj.

Jara abono: 5 fr. (Sm²).

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris

(Francujo).

GERMANA ESPERANTO-GAZETO

estas eldonata en formo de ĉiusemajna revuo kun riĉa raporta kaj literatura enhavo kaj diversaj intereseĝaj aldonoj.

SOWA REGULE APERANTA

ESPERANTISTA SEMAJNA GAZETO.

je plej malalta abonprezo, en Germanujo rekte mendebla ĉe la poŝtoŝejoj (N-ro 576 de la listo) por. M. 1.25 jarkvarone, eksterlanden por Sm. 3.50.

Specimeno kontraŭ respondkuponon.

Abonejo; Esperanto-Propaganda Instituto,

BERLIN, KAISER-WILHELM-Str. 15.

LA KRONIKO

Tutmonda Esperanta Revuo, aperas deklunifoje dum jaro meze de ĉiu monato je amplekso de almenaŭ 12 paĝoj.

Jarabono Sm. 1,000 kun litera-

tura aldonon Sm. 2,000. Unu nu-

mero Sm. 0.150.

Direktoro: *Karlo Steier*

Redaktoroj: *L. E. Meier* (kroniko)

A. Ząkrzewski (statistiko)

ESPERANTO

LA PLEJ OFTA KAJ LA PLEJ DISDISTIGATA!

Oficiala Organo de Universala Esperanto-Asocio.

Duonmonata enhavo tre diversa kaj interasa.

Formato 23 × 32 cm.; ĉiunumere 16 paĝoj.

Jara abono Sm. 2.—

Redaktejo kaj administrejo:

10, rue de la Bourse, Genève (Suisujo)

Oficiala Gazeto-Esperantista

Organo de la lingva Komitato, de la Konstanta komitato de la Kongresoj kaj de la Internacia Konsilantaro

Formato 16 $\frac{1}{2}$ × 25 cm.

Jara abono: Sm. 2.—

Unu numero Sm. 0.200.

Redaktejo kaj Administrejo:

21, rue de Clichy, Paris.

Znakomity podręcznik Pawła Bert'a Kurs Elementarny Nauk Przyrodniczych

W tłumaczeniu ANNY KRATZER, z 48 wyd. fran.

- TOM I.** Rok pierwszy—dla dzieci od 7 do 10 lat. Treść: Człowiek.—Zwierzęta.—Rośliny.—Minerały.—Zjawiska codzienne.—172 rycin. Cena w broszurze rb. 0,50, w oprawie 0,65.
- TOM II.** Rok drugi,—dla dzieci od 10 do 12 lat. Treść: Człowiek.—Zwierzęta.—Rośliny.—Kamienie.—Fizyka.—Chemja.—300 rycin. Cena w broszurze rb. 0,65, w oprawie 0,80.
- TOM III.** Rok trzeci,—dla dzieci od 12 do 15 lat. Treść: Zwierzęta.—Rośliny.—Kamienie.—Ziemia.—Fizyka.—Chemja.—Fizjologia zwierząt i roślin.—Wiedza stosowana.—550 rycin. Cena w broszurze rb. 1,15, w oprawie 1,35.

ŻAŁAĆ WE WSZYSTKICH KSIĘGARNIACH.

SKŁAD GŁÓWNY W KSIĘGARNI GEBETHNERA I WOLFFA W WARSZAWIE.

LIBREJO de M. ARCT

en VARSOVIO

Str. Nowy-Świat 53.

vendas ĉiujn librojn pri kaj en
ESPERANTO:

Libroj, tekstoj en Esperanto
Lernolibroj

Vortaroj

Broŝuroj propagandaj
Literaturo

Scienco

Muziko

Poŝtkartoj

Jurnaloj

Oni mendu la katalogojn,
kiuj estas sendataj senpage.